povas vidi *vin*?" Ŝi dume ĉirkaŭmovis ilin sed sekvis nenia rezulto krom ke la malproksima foliaro iom ondiĝis.

Ĉar tute ne sukcesis la klopodoj levi la manojn ĝis la kapo, ŝi penis mallevi al ili la kapon, kaj tre ĝojis eltrovante ke ŝia kolo estas en ĉiu direkto tre fleksebla, same kiel serpento. Jam kurbinte ĝin en gracian zigzagon ŝi celis enigi ĝin inter la foliaron, kaj eltrovis ke tiu malproksima verda maro estas nur suproj de la arboj sub kiuj ŝi ĉirkaŭvagis kaj parolis kun la Raŭpo.

Sed en tiu momento ŝi aŭdis akran siblokrion, kaj rapide retiris la kapon, ĉar jen granda Kolombo flugas kontraŭ ŝia vizaĝo kaj forte frapas ŝin per la flugiloj.

"Vi *serpento*!" kriegis la Kolombo.

"Mi *ne* estas serpento" indignis Alicio, "vi ne ataku min!"

"Serpento, mi ĝin rediras" ripetis la Kolombo, sed malpli ekscitite, kaj kun ĝemo aldonis la informon: "Ĉiujn rimedojn mi provis, sed kontraŭ ili, nenio taŭgas."—

"Mi ne havas eĉ la plej malgrandan ideon pri kio vi parolas" diris Alicio.

—"Mi provis la arbradikojn, la deklivojn, kaj kreskaĵajn barilojn," daŭrigis la Kolombo, tute ne atentante ŝin, "sed eviti la serpentojn, neeble."



Alicio pli kaj pli konfuziĝis, se
ne utilos diri ion ĝis la Kolombo

Ŝufice ĝenis min la tasko el
diris la Kolombo, "sed ankaŭ n
kaj tage gardi kontraŭ la serp
dum la lastaj tri semajnoj ne p
momenton."

"Mi tre bedaŭras ke oni ĉag
Alicio, ekkomprenante la situaci

"Kaj ĵus kiam mi elektis la p
en la tuta arbaro," daŭrigis la
voĉo absolute kriega, "por ke n
de ili, ili venas tordegante sin el
Fju! Serpento!"

"Tamen mi *ne* estas serpen
diras." protestis Alicio. "M
estas. . . .

"Nu, *kio* vi estas?" diris la K
ja evidente penas trovi taŭgan n

"Mi estas . . . knabineto" i
Alicio, rememorante kiom da ŝ
tago jam spertis.

"Vere tre kredinda aserto!
respondis tre sarkasme, "mi c
vivo vidis multe da knabinet
unu kiu havis tian kolon kian
Serpento vi estas, kaj ne u
Kredeble vi diros al mi ke neni
ovon?"

LEWIS CARROLL *La Aventuroj de Alicio en Mirlando* Esperanto translation (Illustrated by Brinsley Le Fanu) LONDON, 1910 THE BURSTEI